La 23an de januaro 2014

Feliĉan Novjaron al ĉiuj!

Mia gubernio nomiĝas Gunma, kiu signifas “ĉevalaron”, kaj la jaro 2014 estas “Jaro de ĉevalo”, do tiu ĉi jaro estas kvazaŭ jaro de mia gubernio. La simbola pupo de Gunma estas “Gunma-ĉan”. Mi desegnis multajn Gunma-ĉan-ojn sur la supra karto kiel mian salutmesaĝon.

Gunma-ĉan povas paroli kaj danci, ĉar en ĝi estas homo. Nun tiuspecaj pupoj estas tre popularaj en la tuta Japanio kiel propagandiloj de siaj urboj kaj gubernioj. Gunma-ĉan akiris la trian lokon en la lastjara konkurso de la pupoj. Li/ŝi estas tre amindaj.

Kunlaboras suferantoj de la du grandaj Katastrofoj

S-ro Kisara rigardas flamojn, portante fotojn de siaj edzino kaj filo, en Koobe

Je la 5:46 la 17an de januaro okazis Priplora Evento en la Parko Azuma en la urbo Koobe, Hjoogo, en la okcidenta Japanio. Antaŭ 19 jaroj, en 1995, okazis granda tertremo tie kaj mortis 6343 homoj. En tiu evento partoprenis 14 homoj el Toohoku, kiuj suferis/as pro la Katastrofo en 2011.

Unu el ili estis s-ro Kisara Toŝikacu 57-jara el la gubernio Mijagi, kiu perdis sian edzinon en la cunamo kaj poste sian filon, kiu sin mortigis pro mensa sufero pro la katastrofo. Li ĉiam estis en maltrankvilo kaj malĝojo, sed lin savis volontuloj el Koobe. En decembro venis 20 homoj el Koobe kaj helpis al li reordigon de la domo kaj kuraĝigis lin. Li dankas al ili kaj petite partoprenis en tiu evento kun fotoj de siaj edzo kaj filo.

Li diras : “Malmultiĝis volontuloj al la damaĝitaj urboj. Multaj loĝantoj en provizora domo ne havas esperon por la estonteco kaj vivas izolite kaj sola. Ankoraŭ nun volontulaj helpoj estas necesaj”. Li komencis movadi kun koobe-anoj al la registaro, por leĝigi rabatajn veturkoston kaj hotelkoston de volontulaj helpantoj al la damaĝitaj urboj.

(la ĵurnalo Mainiĉi, la 17an de januaro 2014)

Komenciĝis elekto de la guberniestro de Tokio

En decembro la guberniestro de Tokio s-ro Inose eksiĝis pro korupta mono, kaj hodiaŭ la 23an de januaro komenciĝis elekto de la guberniestro de Tokio. Unue al ĝi kandidatiĝis s-ro Ucunomija Kenĵi, eksa prezidanto de la japana advokataro subtenata de Japana Komunista Partio. Alia kandidato estas s-ro Masuzoe Jooiĉi, eksa ministro pri bonfarto kaj laboro subtenata de la nun reganta Liberala Demokratia Partio. Antaŭ du-tri semajnoj subite intervenis s-ro Hosokaŭa Morihiro 76-jara, eksa ĉefministro (maldekstre en la foto), kiu celas fari Japanion libera de nuklea energio, kaj lin subtenas s-ro Koizumi Ĵuniĉiroo, eksa ĉefministro (dekstre).

Tiu Hosokaŭa estas praido de feŭdisma reĝo de Kumamoto en la insulo Kjuuŝuu, kaj estis ĉefministro inter aŭgusto 1993 kaj aprilo 1994, kaj poste li retiriĝis de la politika mondo kaj vivis kiel artisto. Alia eksa ĉefministro Koizumi estis tre populara kaj eĉ nun havas grandan influon en la politika mondo. En tiu ĉi jaro, post kiam li vizitis Onkalon, rubaĵejo de nukleaj rubaĵoj en Finnlando, li subite nuligis sian subtenon al atomenergio kaj komencis kontraŭi la energipolitikon de la nuna registaro. Li insistas, ke nun oni ne havas rimedon senvenenigi nukleaĵojn, do en tia situacio estas ne permeseble produktadi elektorn per atomenergio.

Tiuj du eksaj ĉefministroj nur parolas pri forĵeto de nuklea energio, sed ŝajne multaj homoj subtenas ilin. Tio estas granda minaco al la nuna registaro, do ĝi diradas, ke en Tokio ne troviĝas nukleaj reaktoroj, do la temo de energipolitiko ne taŭgas kiel temo de la elekto.

Pri tio multaj ĵurnaloj kaj homoj opinias, ke Tokio konsumas grandan kvanton da elektro produktita en Fukuŝima kaj estas la plej granda akciulo de TEPCO, tial energipolitiko de Japanio devas esti grava temo dum la elekto.

S-ro Ucunmija ankaŭ kontraŭas la energipolitikon de la nuna registaro, do iuj volis, ke Ucunomija eksiĝu por ke estu unu kontraŭatomenergia kandidato, sed li kaj subtenanta Komunista Partio ne akceptis tiun

proponon, ĉar la politiko de Hosokaŭa pri aliaj aferoj ne estas klara, kaj krome ankaŭ tiu ricevis koruptan monon, kiam li estis ĉefministro.

Certe la energipolitiko fariĝos unu el la grandaj temoj kaj tio estas tre bona afero. Se venkos Ucunomija aŭ Hosokaŭa, tio estos granda bato al la nuna registaro. La baloto okazos la 9an de februaro.

455 urboj kaj vilaĝoj kontraŭas atomenergion

Post la nuklea akcidento en 2011, 455 asemblejoj de urboj kaj vilaĝoj el 1727 prezentis sian kontraŭatomenergian opinion al la parlamento.

HORI JASUO